



PENSEO

N-ro 136

Jan./2003

Monata Beletro Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 <http://anteo.topcities.com>

!!



Feliĉan Novjaron! Pli Grandan Sukceson

En La Nova Jaro!

Redakcio

!!

Verdkora Pli Sanktas ol Furora

—Post legado de Skizo pri la Vivo de Miyamoto Masao

Guozhu

1.
Miyamoto Masao naskiĝis la 8-an de januaro 1913 en Wakayama, Japanio; do, ĉijare, la 8-an de januaro 2003 okazas la 90-a datreveno de lia naskiĝtago.

Por la memorinda jubileo mi, Guozhu, speciale ĉinigiis la artikolon SKIZO PRI LA VIVO DE MIYAMOTO MASAO, kaj verkis recenzon por forte rekomendi ĝin al la ĉina esp-istaro.

La SKIZO estas verkita de Mine Yositaka, eruda japana esp-isto. En Japanio, ĝi jam ne estas nova verko. Tamen, en Ĉinio, ĝia publikigo en dulingva Esp-ĉina versio, ja estas je la unua fojo.

Tio estas la alia kora omaĝo, kiun Guozhu dediĉis al la eminentaj japanaj Esp-istaj geamikoj post la Karmemore pri Verda Majo (ankaŭ je 90-jariĝo) en la pasinta jaro.

2.
Legante la SKIZON, mi sentas, ke Miyamoto estas persono karakteriza okulfrape per konduto pensi per si mem, per konduto enmondiĝi,

per abundaj rikoltoj en multflankaj fruktdonaj laboroj,
per nobla bonvirto.
Lia vivo impone pensigas nin.
Multaj liaj vidpunktoj vekis ĉe ni kaj admirojn kaj simpatian ehxon.
Multe da liaj faroj indas nian imiton aŭ lernadon.

3.
Nia aserto ke Miyamoto estas persono karakteriza okulfrape per konduto pensi per si mem pruviĝas per tio ke li neniam blinde sekvis al furoro, eĉ se tiu en certa tempo kaj spaco havas tiel grandan influon kaj potencon doni prosperon al obeanto aŭ pereigon al spitantoj.

Kiam la faŝisma registaro praktikas politikon agresi eksterlanden kaj subpremi enlande, Miyamoto rifuzis blinde sekvi.
Kiam la militistaro trudis al soldatoj “la honoran morton por la tennoo”, Miyamoto rifuzis blinde sekvi.

Kiam la usona demokratismo estis adorita de publiko, Miyamoto rifuzis blinde sekvi.
Kiam la militoj furiozis en Koreio kaj Vjetnamio, Miyamoto rifuzis blinde sekvi.

Eĉ en movadoj kiujn Miyamoto memvole partoprenis, li ankaŭ ne blinde sekvis.
Pri tia konduto, ĉina antikva saĝulo ja diris tiel, ke “Li sekvas nur tion, kio estas justa.”

4.

Nia aserto ke Miyamoto ekstreme enmondiĝis estas ĉine dusenca: unue, ke li prizorgis la realan socian vivon, simpatiante subprematojn, li neniam agis laŭ negativa konduto de dezertulo fuĝi el la mondo. Due, ke li ekskluzive dediĉis sian vivon al la Esperanto-movado kaj luktis por ĝi dumvive. Kiel persono kun propra vidpunkto, post tiel longdaŭra esplorado, serĉado kaj strebado dum sia vivovojo, li tamen volonte fiksas sin fine al la posteno de profesia esperantisto, senigita laŭdestine je ĉia profitdono, tio montras, ke, en la koro de Miyamoto, Esp-movado estas multe pli supera ol ceteraj multaj vantaj furoraĵoj.

5.

Nian aserton ke Miyamoto estas kun abundaj rikoltoj en multflankaj laboroj pruvis la grandkvanta verkaro kiun li kreis kaj la granda famo kiun li ĝuis laŭmerite.

La tuta kvanto de verkaro de Miyamoto estis tiom mamuta ke por eldoni ĉiom da ĝi jam superas la financan forton de KLEG. Vole-nevole la ligo devas decidi eldoni nur kvar volumojn da elektitaj verkoj.

Prestiĝo de Miyamoto estas tiel alta internacie, ke neniuj el esp-istoj de la Oriento povus kompari kun li unuope.

Kaj, ni devas rimarki, ke, ĉion li faris ja en ege malfacilaj cirkonstancoj. Tio fariĝas vere okulfrapa kontrasto, kio ja estas ankoraŭ pli estiminda kaj respektinda.

Nia aserto pri la okulfrapa kontrasto en la vivo de Miyamoto montriĝas ĉefe je la subaj punktoj:

Unue, abunda rikolto kun malalta bazo de lia lerna historio nur de 8 jaroj en elementa lernejo; due, nobla bonvirto kun malfavora akcepto de socio; kaj trie, ĝuante grandan famon internacie sen rondvizito al fremdaj landoj.

6.

Nia aserto ke Miyamoto estas persono kun

nobla bonvirto devenas de lia obstina strebado dum tuta vivo, sen konsidero pri ĉia persona akiro/perdo aŭ gloro/malhonoro. Li neniam pentis, eĉ je kosto de naŭfoja perdo de sia vivo, pri tio, al kio nur se lia verda koro inklinas.

Kiam li estis arestita kaj sendita al malliberejo, li ne submetiĝis al la faŝisma kruela subpremo, kaj eĉ faris la prizanon sia universitato, kie li aŭtodidakte ellernis Esperanton.

Kiam li laboras kiel la sola plentempa oficisto-organizanto de KLEG, sed apenaŭ pagita pro la financa malforteco de la ligo, li neniam perfidis nian aferon aŭ renegate submetiĝis al la mamonismo, malgraŭ tio ke mankas necesa vivtenado al li kaj liaj familianoj.

Kiam oni traktis lin per miskompreno aŭ nejustaĵo, Miyamoto kun granda animo repagis per virto al nejusta ago, ankoraŭ helpis nin eldoni la senmortan libron Verkoj de Verda Majo, tiel, donante eminentan modelon en kunlaboro de ĉinaj kaj japanaj esp-istoj, kaj restigis al la posteuloj valoran spiritan riĉaĵon. En personeco de Miyamoto ni povas rimarki ke li posedas la bonvirtan stilon de vera noblulo: nek submetiĝi al forto nek ŝanceliĝi pro malriĉeco, kio ja ĝuis plej grandan respekton de ĉinoj.

Dank'al sia specifa karaktero Esperanto-movado havas la eblon kolekti en sian vicaron grandkvantojn da bonvirtaj nobluloj de diversaj nacioj, kaj ĝuste pro tio Esperanto sukcesis travivi suferadon kaj pruvadon en pli ol jarcento da historio kaj montras sin multe pli supera ol ŝaŭme vantaj furoraĵoj rapide mortintaj aŭ finfine mortontaj.

7.

La grandfaroj de Miyamoto vekis ĉe ni altan respekton kaj kaŭzis profundan pensigon.

Tre eble, ekkoni la nomon de Esperanto por multaj el ni okazis nur dank'al ia hazardo. Tamen, se ni kun granda volonteco restis en vicaro de esp-istoj por jardekoj da longa tempo, sen atendo de ajna repago materiala aŭ

profitdona, tio okazas neeble nur dank'al hazardo.

Estas evidente kaj certe, ke al ĉiu ĝisosta esp-isto ankaŭ ne mankas propra vidpunkto spitante al vantaj furoraĵoj. Sen tio kiel forta subtenilo en sia animo, neniu povas teni sin firma senŝanceliĝa membro de Esp-movado kun sobra konscio en la nuna tempo, kiam ĉirkaŭ ni inundas la mamonismo, la lingva mis-politiko senekvilibra far ŝtato kio kaŭzis nenormalan longdaŭran febron de iu hegemonia fremda lingvo tra nia poluita socio. Laŭ opinio de Miyamoto, ke unue homoj devas ŝanĝi sin kaj nur poste estos la eblo ŝanĝi la mondon, sekve, kun tia konvinkiĝo li donis sin ekskluzive al la Esp-movado.

Lia tiu elekto ja igis nin pretervole ekmemori pri la simila anekdoto kiel s-ro Lusin decidis sin doni al literaturo forlasinte la malnovan studfakon en medicina kolegio.

Ĉar ili ambaŭ opiniis ke por nia socio la sana personeco estas pli grava ol forta korpo sen cerbo.

La vidpunkto de Miyamoto pri la "bazo de Esp-movado", liaj pledoj pri la alta takso al la amaso, pri la eldonado de esperantaj libroj, kaj pri la neceso lerni el la historio de la Esperanto-movado, senescepte estas tre utilaj por nia ĉina Esp-movado hodiaŭ, ĉar ĉiu el ili estas kun ekstreme klara celo, kvazaŭ speciale fasonita laŭ nia aktualeco, sekve indas nian atenton por tiri el tio lecionojn kaj profundan pensadon.

8

Miyamoto estas tia eminentulo kiu distingiĝas ĉiuflanke.

Lia fidelo, prudento, neŝancelebla obstineco, senegoisma kuraĝa preteco por solidara kunlaboro kun homoj de diversaj tendencoj, lia senlaca agemo, persista laborado kun paŝoj sur firma grundo, je cio ĉi tio li donis al ni brilan modelon en Esp-movado.

Eĉ se nun troviĝas granda distanco inter ni postiĝanta kaj li avangarda, eĉ se ni staras nur

je malalta starto, tamen, ĉar antaŭ ni estas modelo, kaj vojo sub niaj piedoj. La modelo donita de Miyamoto vere estas lerninda por ni. Miyamoto apartenas ne nur al Japanio, sed ankaŭ al la Oriento, al la mondo.

Respekte klini sin antaŭ la impona alta monto kaj vidante la honestulon, aspiri egaligi sin al la glora modelo, eĉ se tio por ni estas neatingebla revo, tamen ankoraŭ ne ĉesis mia forta aspiro. Ja kun tia verdkora penso mi karmemoras al Miyamoto masao, la glora pioniro en nia kara Esperantujo.

2003-01-08

EL *LAŬZI*



ĈAPITRO 65

(Tiu ĉi ĉapitro proponas, ke oni ne devas regi la regnon per "saĝeco".

Laŭ Laŭzi, regi la regnon per saĝeco estas

por la regno katastrofo; kontraŭe, regi la regnon ne per saĝeco kaj lasi la popolon en senklereco estas por la regno feliĉo.

Tio faras la impreson, ke Laŭzi kvazaŭ estas por la politiko de obskurantismo, sed efektive ne estas tiel. En la ĉapitro 18 Laŭzi skribas: "Kiam inteligenteco kaj saĝeco aperas, / Granda hipokriteco ilin sekvas." Tio montras, ke en efektiveco Laŭzi kontraŭstaras ne al saĝeco mem, sed al hipokriteco kaj artificeco. La ideala socio, laŭ Laŭzi, devus esti tia, en kia la reganto kaj liaj regatoj ne plu uzus "saĝecon" kaj ambaŭ revenus al simplanimeco, kiel priskribite en la lasta parto de la ĉapitro 57.)

De la antikveco tiuj, kiuj praktikas la Taŭnon kun sukceso,

Ne klerigas la popolon per ĝi,

Sed kontraŭe per ĝi malklerigas ilin.

La kaŭzo, kial la popolo estas malfacile

regata,
 Estas, ke ili havas tro da saĝeco.
 Tial regi la regnon per saĝeco estas por la
 regno katastrofo,
 Kaj regi la regnon ne per saĝeco estas por la
 regno feliĉo.
 Do koni la du manierojn (per saĝeco kaj ne
 per saĝeco) estas ankaŭ principo.
 Ĉiam sekvi la principon estas nomata la
 mistera Virto.
 La mistera Virto estas tre profunda kaj
 longedaŭra.
 Ĝi estas kontraŭa al la naturo de konkretaj
 aferoj,
 Tamen ĝi kondukas al la plej granda
 harmonio.



esperantigis Wang Congfang



La Vivo de Pu Songling

(V)

Guozhu



Falis la brila stelo de beletro

En 1715, ĉar la kvina tago de la unua monato lunkalendare estis datreveno de la forpaso de s-ro Pu Pan, spite al frosta vetero Pu Songling gvidis ĉiujn familianojn viziti kulte al la tombejo de s-ro Pu Pan. Reveninte li jam sentis sin malsana. La 22-an sammonate, Pu Songling ellitiĝis ankoraŭ laŭ kutima horo. Li kombis al si, matenmanĝis. Li rifuzis helpon de nepoj kaj mem vizitis kun lambastono al necesejo. Poste, li volis iom ripozi ĉe fenestro. Posttagmeze, kiam nepoj volis lin al vespermanĝo, ili trovis ke Pu Songling, la maljuna s-ro Liaozhai, jam forpasis, trankvile sidante ĉe la fenestro. Tiel

falis la brila stelo de beletro, en aĝo de 76 jaroj, lunkalendare en la 22-a tago de la unua monato de la kvindek-kvara jaro en Kang'xi-erao, Qing-dinastio (sunkalendare: 1715-02-16).

Senmorta monumento

Per energio de sia tuta vivo Pu Songling ellaboris majstran novelaron Strangaĵoj de Liaozhai, kiu atingis kulminon de la ĉinaj noveloj ĉu ideologie ĉu arte, fariĝis mejloŝtono en la literatura historio de Ĉinio kaj ĝuas la famon kiel “reĝo inter novelaroj en la antikva Ĉinio”. Bedaŭrinde, li finfine ne povis propraokule vidi ĝian publikigon dum sia vivo. La unua ksilografia eldono de Liaozhai aperis nur en 1766, je 51 jaroj post lia morto. Sed, kun tempopaso la eldonado de Liaozhai fariĝis pli kaj pli disflora. Krom sennombraj en la ĉina lingvo, nun oni jam povas vidi diversajn eldonojn de Liaozhai en pli ol 30 fremdaj lingvoj, interalie ankaŭ en nia kara lingvo Esperanto, ĝojinde — eĉ en kompleta teksto ! (fino)

u



Eldonas Redakcio de *Penseo*
 Disdonanto Lin Liyuan
 Adreso: Ĉambro 501, N-ro. 72,
 Strato Xitangxilu, Guangzhou,
 Guangdong (510050)

.....
 POŝT-KUPONOJ ESTAS BONVENAJ!

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)
 Adreso: Fremdlingva Fakultato, Shantou
 Universitato, Guangdong 515063, Ĉinio
 Tel: (0754) 2903012 (hejme)
 E-poŝto: ydwei@stu.edu.cn
 Ĉiujn kontribuantojn al la ĉefredaktoro.

